esperanto.es

# La Bitbulteno

NUMERO: 9
2014-07-26

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

## FELIZ CUMPLEAÑOS, ESPERANTO

La Federación Española de Esperanto, junto con el resto de la comunidad esperantista mundial, celebra este 26 de julio el aniversario de la publicación del libro en el que por primera vez se proponía una nueva lengua, que pretendía romper las barreras de comunicación entre los pueblos, y que pronto sería conocida como *esperanto*. Este año la celebración se conmemora bajo el lema "Justicia lingüística", y coincide con el comienzo del 99 Congreso Internacional de Esperanto, que por primera vez se desarrollará en la capital argentina, Buenos Aires.

Ese concepto de igualdad entre los hablantes de la lengua es fundamental en el planteamiento del idioma esperanto. Por esta

## FELIĈAN DATREVENON, ESPERANTO!

Hispana Esperanto-Federacio, kune kun la tuta monda Esperanto-komunumo, celebras tiun ĉi sabaton, la 26an de julio, la publikigon de la Unua Libro, en kiu oni proponis tiun tiam tute novan lingvon, baldaŭ konotan kiel *Esperanto*. Tiun ĉi jaron oni ĝin kunmemoras per la devizo "Lingva justeco", kaj ĝi koincidas kun la komenco de la 99a Universala Kongreso kiu unuafoje disvolviĝos en la argentina ĉefurbo Bonaero.

Tiu ĉi koncepto de egaleco inter la parolantoj de la lingvo estas baza en la fundamento de Esperanto, kaj tial la afiŝo ĉijare desegnita de Universala Esperanto-Asocio, kiu estas videbla en nia retejo en ses

razón, el cartel diseñado este año por la Asociación Internacional de Esperanto, y puede verse en nuestra web en todas las lenguas oficiales españolas, hace hincapié en este concepto de justicia lingüística para todos.

La Federación Española de Esperanto ha organizado este sábado un acto conmemorativo en nuestra sede de Madrid, con la participación entre otros de Dennis Keefe, de nacionalidad estadounidense y miembro del Comité de la Asociación Universal de Esperanto, y conocido en nuestro país por vivido durante varios años en Madrid, donde participó en los años 80 en la consolidación del movimiento de la capital.

HEF también ha emitido un comunicado de prensa, del que se han hecho eco diversos medios, enfatizando la importancia del esperanto y su contribución a la justicia lingüística, en este año en que se cumplen 60 años de la resolución de la UNESCO que reconoció los valores culturales del idioma internacional.

oficialaj lingvoj de Hispanio, substrekas tiun ĉi koncepton de lingva justeco por ĉiuj.

Hispana Esperanto-Federacio organizis ĉisabate kunmemoran agadon en nia sidejo en Madrido, kun partopreno interalie de Dennis Keefe, usona civitano kaj komitatano de Universala Esperanto-Asocio, konata en nia lando ankaŭ pro sia plurjara loĝado en Madrido, kie li kontribuis al la firmigo de la movado en la ĉefurbo dum la 80aj jaroj.

HEF ankaŭ lanĉis gazetarkomunikon, kiun eĥis diversaj komunikiloj, emfazante la gravecon de Esperanto kaj ĝian kontribuon al la lingva justeco, en tiu ĉi jaro kiam ni ankaŭ kunmemoras 60 jaran datrevenon de la rezolucio de UNESKO agnoskanta la kulturajn valorojn de la internacia lingvo.




**SECCIÓN ESPAÑOLA DE LA LIGA DE PROFESORES DE ESPERANTO**

La Liga Internacional de Profesores de Esperanto acaba de aprobar en su Conferencia Anual, que durante estos días se ha celebrado en Montevideo (Uruguay), la creación de la sección española de la organización.

Se trata de la culminación de los esfuerzos que la Federación Española de Esperanto ha estado llevando a cabo durante este último año para coordinar las actividades de enseñanza del esperanto en nuestro país, y que recibió un impulso mediante la celebración en el seno del Congreso Español de Esperanto de

**KREITA LA HISPANA SEKCIO DE ILEI**

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ĵus aprobis en sia Konferenco, celebrita dum tiuj ĉi pasintaj tagoj en Montevideo (Urugvajo), la kreadon de la hispana sekcio de ILEI.

Temas pri la kulmino de la penoj entreprenitaj de Hispana Esperanto-Federacio dum la lasta jaro por kunordigi la aktivadojn pri instruado de Esperanto en nia lando, kaj kiu ricevis fortan elanon danke al la okazigo, ene de la Hispana Esperanto-Kongreso en Arundo, de la 1-a Hispana Konferenco pri la Instruado de Esperanto.

Ronda de la 1ª Conferencia Nacional sobre la Enseñanza del Esperanto.

HEF continuará esta labor de coordinación, y hace un llamamiento a todos los profesores de esperanto y personas interesadas en la enseñanza del esperanto y el reconocimiento de los cursos del idioma, para contactar y colaborar con la recién creada sección de enseñanza de la Federación.

HEF daŭrigos tiun ĉi laboron por kunlaborado, kaj alvokas la instruistojn de Esperanto en nial ando, kaj aliajn homojn interesitajn en la edukado kaj la agnosko de la kursoj de nia lingvo, kunlabori kun la ĵus kreita sekcio pri instruado en la sino de la Federacio.

**COMIENZA EL CONGRESO MUNDIAL DE ESPERANTO EN BUENOS AIRES**

Como informábamos en el anterior *Bitbulteno*, el 99 Congreso Mundial de Esperanto, organizado por la Liga Argentina de Esperanto, en colaboración con la Asociación Universal de Esperanto, tendrá lugar este año 2014 en la ciudad de Buenos Aires. El encuentro se inaugura precisamente el 26 de julio, aniversario del nacimiento del esperanto, y finalizará el 2 de agosto. La Federación Española de Esperanto tomará parte en la Feria de asociaciones que tendrá lugar al comienzo del encuentro, y mostrará algunas de sus actividades.

Más información en: http://www.esperanto.org.ar/uk2014/.

**KOMENCIĜAS EN BONAERO LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

Kiel ni informis en la pasinta *Bitbulteno*, la 99-a Universala Kongreso de Esperanto disvolviĝos ĉijare en la argentina ĉefurbo, Bonaero, organizata de la Argentina Esperanto-Ligo, kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio. Ĝi komenciĝas la 26-an de julio, la datrevenon de nia lingvo, kaj finiĝos la 2-an de aŭgusto. Hispana Esperanto-Federacio partoprenos la Movadan Foiron kiu estas organizata por la komenco de la aranĝo, kaj montros kelkajn siajn aktivadojn.

Pliaj informoj en: http://www.esperanto.org.ar/uk2014/.

**ENCUENTRO DE JÓVENES ESPERANTISTAS DE LA PENÍNSULA IBÉRICA**

El Encuentro Ibérico es un evento esperantista que se celebra todos los años en un lugar de la

**IBERIA RENKONTIĜO EN KATALUNIO**

La Iberia Renkontiĝo temas pri ĉiujara esperantaĵo okazanta ie en Iberio kunorganizata de Portugala Esperanto-Junularo,

Península Ibérica, co-organizado por la Juventud Esperantista Portuguesa, la Sociedad Juvenil Esperantista Española y la Juventud Esperantista Catalana. En 2014 el Encuentro será organizado por esta última asociación en L'Arboç, una encantadora localidad del Bajo Penedés, una comarca conocida por su producción de vino y cava, entre el 5 y el 7 de septiembre.

Albergará el encuentro el Ateneo de L'Arboç, donde tendrán lugar la mayor parte de las actividades.

Para más información sobre el programa, las formas de apuntarse, la forma de llegar y los datos de contacto, visitar la página del encuentro; http://esperanto.cat/ir2014/.

Hispana Esperantista Junulara Societo kaj Kataluna Esperanto-Junularo. En 2014 la renkontiĝo estos organizata de ĉilasta organizaĵo, kaj ĝi okazos en L'Arboç, ĉarma urbo de Katalunio, situanta en regiono konata pro sia produktado de vino kaj ĉampano, inter la 5a kaj la 7a de septembro.

Gastigos la renkontiĝon la Ateneo de L'Arboç, kie okazos plimulto de la programeroj. La organizantoj proponas gastigi la partoprenantaron senpage en sportejo.

Pluaj informoj pri programo, aliĝado, alveneblecoj kaj kontakto troviĝas en la retejo de la aranĝo http://esperanto.cat/ir2014/.

IR
IBERIA
RENKONTIĜO
2014
5an/6an/7an de septembro
L'Arboç (Katalunio)

**CONDOLENCIAS POR EL FALLECIMIENTO DE ÁLEX ANGULO**

La Federación Española de Esperanto lamenta el fallecimiento de Alex Angulo, inolvidable protagonista de "El coche de pedales", donde interpretaba a un profesor de esperanto, y con quien la asociación colaboró durante el

**FUNEBRO PRO LA FORPASO DE AKTORO ÁLEX ANGULO**

Forpasis pro trafikakcidento Alex Angulo, tre konata en Hispanio aktoro, ĉefrolulo de "La pedalaŭto", kie li rolis kiel instruisto de Esperanto. Hispana Esperanto-Federacio, kiu kunlaboris kun li en la filmado, kondolencas al ĉiuj liaj

rodaje. Ni funebras.

familianoj, amikoj kaj admirantoj.




**ESPERANTO EN ARAGONÉS**

Dentro del programa de ampliación de la diversidad lingüística de la web de la Federación Española de Esperanto, durante los pasados días se han publicado varias de las página en el idioma aragonés. Pueden leerse en la siguiente dirección: [http://www.esperanto.es/hef/index.php/ara-presentazion](http://www.esperanto.es/hef/index.php/ara-presentazion)

**ESPERANTO EN LA ARAGONA LINGVO**

Ene de la programo de plurlingvigo de la retejo de Hispana Esperanto-Federacio, estis ĵus publikigita la versio de diversaj paĝoj en la aragona lingvo. Ili estas viziteblaj en la adreso: [http://www.esperanto.es/hef/index.php/ara-presentazion](http://www.esperanto.es/hef/index.php/ara-presentazion)


DIYA D'O
ESPERANTO
2014
Chustizia luenguistica
26 de chulio d'o 2014
Aprende esperanto: www.lernu.net